

DUMONATA REVUO/TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

Sonorilo

66A JARO, N-RO 2

MAR-APR. 1974

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St.-Bernardsesteenweg 1078, 2710 Hoboken.
 Poŝtĉekkonto n-ro 000-0163434-86 je nomo de BEF.
 Prezidanto : D-ro Pol Denoël, rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.
 Redakcio : Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.
 Ĉefredaktoro : Fernand Roose
 Redakcia sekretario : Paul Peeraerts

SUR LA KOVRILO

Pitoreskan anguleton en Lieĝo prezentas tiu ĉi plumdesegnaĵo. En la sama urbo okazas la ĉi-jara Belga Esperanto-Kongreso, pri kiu vi povos legi raporton en la venonta numero de "Sonorilo".

FONDAĴO MAURICE JAUMOTTE-LOQUET

	Jaro	1973	
Kapitalo:	transpreno		141.005
	Van Gompel, Edegem		230
	Hofkens, Antwerpen		500
	Govaerts, Hoboken		1.000
	Maertens, Brugge		1.000
			<u>143.735 F.</u>
Rentumo:	transpreno	10.887	
	en 1973	9.120	
		<u>20.007</u>	
	elspezoj	227	
		<u>19.780 F</u>	
	pago faldfolioj	22.198 F	
		<u>- 2.418 F</u>	
		=====	
La rentumo de 1973 egalas al proksimume 7 % post dedukto de la impostoĵoj. En 1974 la fondaĵo jam ricevis de			
	Van Gompel, Edegem		230
	Van Ginderen, Essen		600
	Anonimulo		10.000
	Ernst, Bruselo		10.000
	transpreno		<u>143.735</u>
	Fino de marto		<u><u>164.565 F.</u></u>

AKTUALAJ DIRENDAĴOJ

de Humphrey Tonkin

Hodiaŭ la principoj de Gandhi kaj Macchiavelli batalas en amara kaj senhalta luktado por la mensoj de la homaro. Kiel neniam antaŭe, oni hodiaŭ pravigas mensogojn en nomo de pli altaj celoj. Pasas eĉ ne unu tago sen iu nova pravigo de la hegemonio de la grandaj potencoj laŭ terminoj, kiuj sugestas, ke en tiu hegemonio kuŝas la ŝlosilo de la universala paco. Pasas eĉ ne unu tago sen faligo de bomboj, nudigo de arboj, mortigado kaj krippligado de homoj cele al tio, kion la politikistoj nomas paco. Pasas eĉ ne unu tago, sen ke iu politika sciencisto publikigas traktaĵon por pravigi, per komputero kaj statistiko, iun novan maljustecon praktikan ne de homoj kontraŭ homoj sed de la anonima potenco de la amaso kontraŭ la individuo. Mensogoj fariĝas vivmaniero por tiel multaj mondaĵ gvidantoj, oriente samkiel okcidente, kaj ili sin pravigas dirante, ke ilia potenco devenas ne de individuoj sed de la kolektiva forto, kies interesojn ili devas servi.

En la lastaj du-tri jaroj, ni vidis reagon kontraŭ tiu mistifikado, en la studentaj ribeloj kiuj disŝiris niajn universitatojn en Ameriko, Eŭropo kaj la Fora Oriento. Gejunuloj, lacaj pri malplenaj moralizadoj de la plenaĝuloj, leviĝis ribele, ofte balbute kaj kelkfoje laŭmode, kontraŭ la nehumaneco de la vivmaniero kiu metas lojalecon al la ŝtato kaj la kutimo super la bezonoj de la individuo — bezonoj, iom ironie, difinitaj kaj priskribitaj de la psikologoj-servantoj de tiu ŝtato kaj la kutimo. Estus erare priskribi la studentan ribelon kiel rektan konsekvencon de la ideoj

de Gandhi, sed certe la fido je la individuo kaj liaj rajtoj estas komuna al ambaŭ, kaj en ambaŭ ni trovas malamon de la misuzo de la potenco.

Dum tiu ĉi lukto daŭras, ni ne povas ĝin ignori. Ni estas parolantoj de Esperanto, lingvo konceptita en konvinko, ke rekta homa komunikado, sen interveno de maŝinoj aŭ interpretistoj aŭ frazlibroj, estas signo de nia homeco. En la kredo ke la lingvo estas senfi ne valora afero, kiun unu homo ne uzu kiel flekseblan instrumenton por terori aŭ konfuzi alian homon malpli lertan pri ĝia uzado, kaj en niaj klopodoj forigi la malbonojn de lingva kaj kultura diskriminacio, ni estas firme kunligitaj, vole-nevole, al la supozo, ke la spiritaĵ kaj materiaj bezonoj de individuoj devas esti respektataj kaj pritraktataj en spirito de humaneco...

En la lasta tempo la Esperanto movado moviĝis for de la interna ideo, kiu liveris al la fruaj esperantistoj la forton daŭrigi la disvastigon de la Internacia Lingvo, ofte en tre malfavoraj cirkonstancoj. La interna ideo donis al ili kredon je monda frateco kaj internacia harmonio, kiu facile deĝeneris al sentimentalismo kaj sektismo, sed kiu estis tre kapabla daŭri. Sed lastatempe ni fariĝis pli praktikaj. Ni parolas nun pri la ekonomiaj, ne la moralaj kostoj de lingva diverseco, kaj ni emfazas la praktikan malhelpon al internacia komunikado.

Sed mia opinio alvenis la tempo denove ĵeti rigardon al la interna ideo. La horora kondiĉo de grandaj sekcioj de la mondo devus nepre konvinki nin, ke

oni ne povas dividi moralajn disde praktikaj konsideroj, ke la du estas ĉiam interrilataj. Kiam nacio ignoras moralecon je la nomo de politika progreso, la rezulto estos finfine memdetrua, kaj ĉiam kondukos nur al pli granda memoraleco. Kaj memoraleco estas propradifine tiraneco. Tion krias hodiaŭ la tutmonda junularo al tiuj, kiuj estas pretaj aŭskulti, sed la aŭskultantoj mal multas. La samo validas por ni en la Esperanto-movado. La problemoj de tutmonda paco, de la leĝeco de la milito, de la moraleco de vastaj elspezoj je defendado kaj armiloj, estas demandoj, kiujn ni ne preterpasu aŭ evitu pridiskuti. Nia lingvo servas la homaron en paco, ne homaron en milito. Sekve ni havas devon krei la kondiĉojn, en kiuj nia lingvo prosperos.

Mi ne proponas reiron al la malaktualiĝinta idealismo de la frua Esperanto-movado. Mi tamen ja proponas, ke ni agnosku niajn sentojn pri tiuj ĉefaj demandoj de nia epoko kaj utiligu Esperanton kiel ilon por esprimi tiujn sentojn. Ni posedas metodon de komunikado ŝlosita al la plejparto de la homoj: ni povas en niaj kongresoj renkonti homojn el ĉiuj mondpartoj vizaĝ-al-vizaĝe, ne kiel delegitojn de la respektivaj landoj, sed kiel homojn, al kiuj ni povas paroli rekte kaj sen malhelpoj...

Karakterizis la Esperanto-movado en la lastaj jaroj certa timeco. Ni timas fariĝi ne reprezentaj. Oni povus diri, ke ni formulis novan oran regulon, ke niaj organizoj estas malfermaj al ĉiuj homoj, sen konsidero pri iliaj konvinkoj, kondiĉe ke ili subtenas Esperanton, pro ĉiu ajn kaŭzo. Mi kredas ke tiu ora regulo estas iom bedaŭrinda regulo. En niaj klopodoj eviti la antagoni-

smo ni perdis la galvanismon. Kiel oni povas senti profundan lojalecon al dek ses reguloj daŭrdeko da akcentoj sur la lasta silabo? Kial la nacioj de la mondo povas entuziasmiĝi pri kelkaj participoj? Dank! al Dio, ili ne povas. Mi ne sugestas kompreneble, ke el niaj organizoj, ni forjetu tiujn homojn, kiuj ne samopinias kun ni. Tute male. Sed anstataŭ treti delikate por eviti ies ofendiĝon, ni igu niajn organizojn dinamisme kunligitaj fortoj por paco kaj justeco kaj la junulara idealo...

Ni prezentu rekte la aferon. Aŭ ni ekmovu nin sensancele al akcepto de idealoj firme kredantaj, aŭ ni mortu je apatio. Ekzistas do elekto de vojoj, sed la elekton oni ne povas eviti. Dum ĉiuflanke la junularo protestas kontraŭ la nehumaneco de nia epoko, ni ne povas ignori tiun krion. Cetere ignori ĝin estas samtempe ignori la bezonojn de la propra membraro, kune kun la bezonojn de nia generacio...

La unua paŝo al la formulado de idealoj estas la utiligo. En mondo dividita kontraŭ si mem, la posedanto de rimedo unuiga ne rajtas, morale, lasi ĝin neuzata. Ni devas parolnian lingvon, skribi ĝin, disvastigi ĝin per ĉiuj rimedoj. Eble nia manko de konvinko fontas de duboj pri la akcepto de Esperanto. Sed al tiuj duboj ekzistas du respondoj. Unue, dum Esperanto ankoraŭ ne akceptiĝis kiel universala lingvo por ĉiuj homoj, estas eĉ pli grave, ke ni plene utiligu ĝiajn unikajn avantaĝojn. Due, en la lastaj jaroj la homo montris, ke preskaŭ ĉio ajn internas liajn kapablojn. La unuaj spuroj de la homo sur la luno donas unu klaran lecionon: per mono kaj obstino kaj la fortoj de la historio, la homo estas ĉionkapabla. ■

ĜENERALA JARKUNSIDO DE B.E.F.

Sabaton, la 16an de marto la ĝenerala jarkunsido de BEF okazis en Bruselo en salono de la Norda Stacidomo.

La ĝenerala sekretario, S-ro J. Verstraeten, kaj S-ro Gr. Maertens (anstataŭanto de S-ro R. Balleux, kasisto) raportis - unuflanke - pri la aktiveco de la federacio kaj - aliflanke - pri ĝiaj financoj.

Malgraŭ la pligrandiĝo de la kotizoj la membraro kreskis per pli ol 10%. En 1972 = 511 membroj; en 1973 = 575 membroj. Nova grupo "Esperanto-grupo de Welkenraedt" aliĝis. La Verviersa Esp. grupo gajnis la premion Jennen pro la plej granda kresko en 1973.

La nova kategorio de aliĝantoj al BEF estas la "Amikoj de Esperanto". Estas sukceso laŭ financa vidpunkto kaj ankaŭ ĉar la enspezita mono - tiun ĉi fojon - venas el ne-esperantista publiko. Pro la nunaj spertoj certe la proksima jaro montriĝos same sukcesplena.

La nacia revuo "Sonorilo" ankorau ne sukcesis regule aperi. Nova solvo nun: ĝi estos tajpita en Antverpeno kaj poste daŭrigos la aperado laŭ ofsetmaniero (kiel ĝis nun).

Finance estas multe pli favora kaj la regula aperado garantiata.

Aliflanke venis propono de Brita Esperanto-Asocio por eldoni "Eŭropa(n) Esperantisto(n)". Principe BEF akordiĝas sed devos okazi ankoraŭ multajn priparolojn sur tiu tereno antaŭ ol akiri kontentigan solvon.

"Esperanto Panorama" (por la flandra regiono) kaj "l'Esperanto en Marche" (por la valona regiono) daŭrigas siajn propagandajn rolojn inter la ne-esperantista publiko. l'Esperanto

to en Marche, kiu aperis ĝis nun ĉiumonate, transiros al dumonata aperado. Oni serĉas ankaŭ eblecon adapti la presmanieron: la sama kiel Esperantoto-Panorama.

B.E.F. transprenis la nederlandlingvan kurson "Esperanto Programita" de S-ro P. Peeraerts, kies represo jam necesas. Li daŭrigos la estradon kaj jam havas novajn ideojn rilate la reklamo kaj la diskonigado en Belgio kaj Nederlando.

B.E.F. sukcesis presigi nederland- kaj franclingvajn faldfoliojn kiuj jam multe utilis. Ili estas je la dispono de la grupoj respektive po 0,90 F. kaj 0,75 F. por unu ekzemplero. La iniciatintoj-realigantoj, S-roj G.C. Fighiera kaj P. Peeraerts, meritas plenan laŭdon. La 55a Belga Kongreso okazis en Luksemburgo en la kadro de la 1-a Eŭropa Esperanto-Kongreso. Tiu lasta iĝis sukceso el vidpunkto de ĉeestado (eĉ Prof. I. Lapenna ĉeestis).

Prezidanto D-ro P. Denoël ludis gravan rolon. Eŭropa Esperanto-Centro kreiĝis kaj li iĝis la direktoro. En la daŭro de la jaro el pluraj landoj de la Eŭropa Ekonomia Komunaro venas kunlaboro. Unua rezulto jam estas ke S-ro Govaers, ĝenerala sekretario de la "Eŭropa Centro de la Kulturo" en Bruselo, pretis eldoni, favore al la eŭropaj instruistoj, pedagogian labormaterialon ankaŭ en Esperanto (ĝis nun nur en angla kaj franca lingvoj).

Denove Esperanto-Tago okazos en Bruselo dum septembro 1974. Kunlaboras al ĝi: BEF, BEFA, SAT-Amikaro, Naturamikoj, ILEI ktp.

Komitato formiĝis kaj jam regule kunvenas por ke la plej bonaj rezultoj estu akirataj.

S-ro Ch. Poupeye prizorgis la nederlandlingvan tradukon de la nova BEF-statuto kiu aperos baldaŭ en la Statgazeton.

La regularon pri Interna Ordo kaj la Statuton de la Fondaĵo Jaumotte-Loquet oni ŝuldas al la lerteco de S-ro Gr. Maertens, kiu zorgeme kunmetis ilin.

La heredaĵo Angelet stagnas. S-ro Gr. Maertens klopodos intertrakti la notarion kaj la heredontojn por akiri kompromison.

La belga partopreno al la Universala Kongreso en Beogrado ĝis sukcesplena dank' al S-ro Gr. Maertens, kiu organizis laŭ neimitebla maniero la "Karavanon al la Suno", t.e. aŭtobusvojaĝo tra Belgio, Germanio, Aŭstrio kaj Jugoslavio ĝis Beogrado kun postkongresa vojaĝo tra Jugoslavio. La partoprenintoj al tiu karavano unuanime entuziasmiĝis pri la entrepreno.

La organizantoj de la Trilandaj Renkontiĝoj en la regiono de Lieĝo, Aachen kaj Maastricht kune kun tiuj de la Markolaj kongresoj (Norda Francio, Suda Anglio, Okcidenta Belgio) meritas plenan laŭdon pro la akiritaj rezultoj.

Saman laŭdon meritas Ges-roj J. Hérimon por la organizo de la Parlamentana subskribkampanjo kiu nunmomente stagnas pro la registara krizo; S-ro Cl. Tholet kaj filo pro la televida prezentado pri Esperanto; S-roj G. Debrouwere kaj C. Vanbiervliet el Kortrijk kie ili propagandas Esperanton kun neatendita sukceso; S-ro G. Pirlot la izolulo fakte, sed kiu tage kaj nokte laboras por Esp. sur multaj terenoj - precipe la instruado tereno; la amikoj en Bruĝo kiu per ekspozicio, pre-

legoj kaj debatoj metis Esperanton denove en la plenan publikan intereson; la fervoruloj el Antverpeno pro la vintra ciklo kaj ĉiusemajna aktiveco; la grupo de Kalmthout pro la organizado de la Tago pri Internacia Amikeco; S-ro G. Vanbreuse pro lia nelacigebla agado en la junulara medio de Verviers kaj S-ro L. Vertongen kiel konstanta animantino en sia regiono de Eupen kie oni parolas pri Esperanto dank' al ŝia aktiveco.

Laŭ S-ro Gr. Maertens (nome de S-ro R. Balleux, kasisto) la financoj estas sanaj ĉar postrestas malgranda profita sumo de 1263 F. Li pravas tion per laŭtleĝo de la bilanco.

S-ro P. Peeraerts ensendis raporton pri BEJA (Belga Esperanto-Junulara Asocio) en kiu li substrekas la regulan aperadon de la revuo "Koncize", eldonita kunlabore kun Nederlando, Francio, Germanio kaj Italio.

La aktiveco en Belgio konsistas el la ĝenerala instigo je partopreno al eksterlandaj kaj internaciaj junularaj aranĝoj. Al la seminarioj de Germana Esperanto-Junularo kaj al la Internaciaj Konferencoj de TEJO ĉiam ĉeestas delegita grupo, kiu, kompare al la grandeco de Belgio, estas konsiderinda. En la nederlandlingva junulara revuo TOP regule aperas Esp. kurso. Pli ol 500 de la legantoj komencis studi. La kurso finiĝos dum 1974. La espero estas ke pluraj restas por pleningi la rangojn de BEJA.

S-ro L. De Sutter de BEFA raportas pri ties aktiveco. Li estas kontenta pri la agado de la asocio sed deziras pli da kontakto kun la membraro. Se la BEFA-anoj ne povas ĉeesti la kunsidojn, ke ili sendu almenaŭ siajn kritikojn aŭ suges-

tojn. Eĉ kelkaj estraranoj estu pli regulaj.

BEFA duobligis sian membronombron ĉe Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. La revuo "Tamen" aperis kiel planita: 4 fojojn jare. Sed ne ĉiam akurate: pro troa okupiteco de la redaktoro, S-ro L. De Bruyne. La membroj ne sufiĉe regule ensendis artikolojn.

La prezidanto de FISAIC (Internacia Federacio de Art- kaj Intelektaj Societoj por Fervojistoj) S-ro Gilles, rekonis la agadon de BEFA kiel unu el la plej aktiva ĉe la Belgaj Fervojoj. Sekve la Esp. kursoj igos senpagaj por la fervojistoj. La oficialaj organoj de la Belgaj Fervojoj "Le Rail" kaj "Het Spoor" regule aperigas artikolojn prilaa aktiveco de BEFA.

La membroj de BEFA kontentige partoprenis al la enlandaj kaj internaciaj okazintaĵoj: Trilanda kongreso en Luksemburgo, Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno en Aŭstrio, la UEA-kongreso en Beogrado, la postkongreso en Kopenhago, la GEFA-jarkunsido en Koblenz kaj FFEA-jarkunveno en Parizo.

La propra ĝenerala jarkunsido okazis en la monaĥinejo de Ficherfont (Waterloo) kun 126 ĉeestantoj. Pluraj delegitoj el la eksterlando ĉeestis. Bela, ampleksa programo allogis la partoprenantojn.

S-ro G. Pirlot, nome de la belga sekcio de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) faris raporton pri la aktiveco de la belga sekcio al kiu precipe mankas monon por grandskale diskonigi Esperanton en la instruistajn mediojn. La estraro kunmetis statuton, kiun oni publikigis en la Statgazeton por akiri laŭlegan personecon.

S-ro G. Pirlot, persone, multe klopodis fari kontakton kun la oficialaj instancoj kaj jam ek eldonis modestan revueton por informi la gemembroj de ILEI. Li esperas je pli da kunlaborantoj.

Post aprobo de la Statuto, la Regularo pri Interna Ordo de BEF kaj la Statuto de la Fondaĵo Jaumotte-Loquet oni elektis la delegitojn de la belgaj grupoj por 1974. Jen la rezulto:

Antverpena grupo "La Verda Stelo": René Balleux, Henri Boljau, Jan Bovendeerd, Jo Haazen, Imelda Haazen, Jules Verstraeten.

Blankenbergaga grupo "La Norda Stelo": Albert Marmenout

Bruĝa Grupo Esperantista: Charles Poupeye

Bruĝa Grupo "Paco kaj Justeco": Roger Martens

Esperantista Grupo de Verviers: Andrée Hérimon

Esperanto-Grupo de Eupen: Louise Vertongen

Esperanto-Grupo de Welkenraedt: André Fabry

Genta Esperanto-Klubo: Adhemar Van de Velde

Junulargrupo St. Kruis: Dirk Maertens

Karlorega Grupo Esperantista: Simonne Fichet

Kalmthouta Esperanto-Grupo: "La Erikejo": Erhart Boehme

Kortrejka Esperanto-Grupo: Cesar Vanbiervliet

Lieĝa Grupo Esperantista: Serge Denoël, Clément Tholet

Lovena Esperanto-Asocio: Anna Meurrens

Reĝa Esperantista Brusela Grupo: René Jacobs, Elfriede Ernst

Izoluloj: Isabelle Van Parijs

FUNKCIULOJ laŭstatute indikitaj
Komitatano A de UEA : D-ro Pol
Denoël
Komitatano B de UEA : Grégoire
Maertens
Administranto de "Fondaĵo Jau-
motte-Loquet" : Grégoire Maertens

Ĉefdelegitino de UEA : Andrée
Orsolini

Redaktoro de la revuo "Sonoro-
rilo" : Fernand Roose

Direktoro de la librejo "Sono-
rilo" : Roger Iserentant

Reprezentanto de BEJA : Paul
Peeraerts

23 grupaj administrantoj + 7
funkciuloj = 30. Kooptaj admi-
nistrantoj rajtas esti aldona-
taj po 1/3 de 30 = 10. Tiuj es-
tas :

Brusela teritorio: Gian Carlo
Fighiera, Simonne Opsomer
Franclingva teritorio: Georges
Vanbrouere, Germain Pirlot, An-
ré Pirson

Nederlandlingva teritorio: Ge-
rard Debrouere, Wim de Smet,
Eddie Frederickx, A. Geysels,
Marie-Thérèse Henquinez.

La estraro formiĝas el la 6
funkciuloj : D-ro P. Denoël,
F-ino A. Orsolini, S-roj Gr.
Maertens, F. Roose, R. Iseren-
tant, P. Peeraerts,

kaj la
3 administrantoj de Brusela
teritorio : S-roj R. Jacobs,
G.C. Fighiera, S-ino E. Ernst.
3 administrantoj de Francling-
va teritorio : S-inoj A. Héri-
on, S. Fichet, S-ro Cl. Tho-
let

3 administrantoj de Nederland-
lingva teritorio : S-roj R.
Balleux, Ch. Poupeye, J. Ver-
straeten.

FUNKCIOJ EN LA ESTRARO

Federacia prezidanto :
D-ro P. Denoël
Vicprezidanto :

S-ro R. Jacobs
S-ro Ch. Poupeye
Ĝenerala sekretario :
J. Verstraeten
Federacia kasisto :
S-ro R. Balleux

S-ro J. Verstraeten anoncas si-
an eksigon ekde la ĝenerala
jarkunsido 1975. ■


RADIO-DISKO DE NIKOLAJ RYTKJOV

"Grupo Kvin ; Esperanto en la
Radio kaj Televido" estis lan-
ĉita de la urbestro de Brigh-
ton (prononcu: brajtn) dum la
tiea Brita Esperanto-Kongreso
en 1972. La impona publika i-
naŭguro generis grandan entuzi-
asmon kaj optimismon pri la
celo de la nova organizaĵo,
nome Esperanto-kursoj en la ra-
dio kaj televido.

Kun granda intereso sekvis la
evoluon de la agado la konata
Esperanto-aktoro Nikolaj Ryt-
kjo. En aprilo de 1973 Niko-
laj Rytjkov partoprenis en la
provregistroj por la unua ra-
dio-kurso de Grupo Kvin. Be-
daŭrinde je la 1-a de septem-
bro li mortis, kaj ne povis
partopreni en la finregistro.

Multaj el la literaturaj reci-
taloj de Nikolaj Rytjkov, ki-
ujn li ofte prezentis en la
londona Esperanto-Klubo kaj
aliloke, estis bonkvalite re-
gistrataj kaj estas nun eldon-
otaj sur longdaŭra gramofondi-
sko "Elektitaj Eroj de Nikolaj
Rytjkov".

Jen kelkaj teknikaj detaloj :
Enhavo : 18 eroj sub redaktado
de Reto Rosetti
Daŭro : proks. 45 minutoj
Prezo : 241 fr., ĉion inkl.



KOMUNIKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Daŭrigante sian pretigon de la
8-a Oficiala Aldono al la "Un-
iversala Vortaro", kaj de la
"Baza Oficiala Radikaro", ki-
ujn mi esperas povi publikigi
baldaŭ en dua kajero de la "Ak-
toj de la Akademio", la Akade-
mio jam voĉdonis pri du gravaj
punktoj, kaj alvenis al decidoj
jenaj :

1° La Akademio, post vastaj in-
ternaj diskutoj, malkonsilas
la uzadon de la prepozicio PO
por esprimi la rilaton indiki-
tan per la frakci-streko en
esprimoj kiel 30 km/h kaj sim-
ilaj, kiel rektan eraron kont-
raŭ la ĝusta signifo de tiu
prepozicio, difinita de Zamen-
hof en unu Lingva Respondo.

Manke de specifa prepozicio
por tia uzado, la Akademio las-
as liberecon al fakuloj elek-
ti inter la prepozicioj EN, JE,
POR aŭ SUR, laŭ la cirkonstan-
coj, aŭ uzi adverban formon,
kiel "30 kilometroj(n) hore".

2° La Akademio, konsiderante,
ke la Lingva Komitato, kiam ĝi
en 1922 malkonsilis la enkon-
dukon de la sufikso -io por
formi landnomojn, bazis sian
decidon sur la konstato de la
tiama uzado ;

konstatante, ke
nuntempe, malgraŭ tiu oficiala
malkonsilo, la uzado de tiu su-
fikso -io ne malkreskis, sed
male disvastiĝis ;

memorante la
vojon, indikitan de Zamenhof,
en la Antaŭparolo al la Funda-
mento por ebligi senrompan ev-
oluon de la lingvo, kaj konsi-
stantan en la propono de for-
mo nova, uzebla parelele kun
la malnova formo ;

opinias, ke la
okazo de la sufikso -io apud
la fundamenta -ujo por ricevi
pli internaciajn formojn de
landnomoj estas ĝusta apliko
de tiu Zamenhofa uzado ;

kaj, nuligante
la antaŭan malkonsilon de la
Lingva Komitato, sed ne sanĝan-
te ĝin al rekomendo, lasas al
la ĝenerala uzado libere deci-
di pri la venko de la pli int-
ernacia formo.

Vitry,
la 4-an de Februaro 1974,
La Prezidanto de la Akademio,
G. WARINGHIEN.

GASTIGANTOJ VIN ATENDAS !

Ĝus aperis la broŝuro Pasporta
Servo, kiu enhavas 40 adresojn
de personoj, kiuj pretas gast-
igi senpage esperantistojn, en
19 landoj sur 5 kontinentoj.
Por ricevi la broŝuron sendu 6
internaciajn respondkuponojn
al Jeanne-Marie Cash, 72 rue
de Rennes, F-75006 Paris. Vi
povas pagi ankaŭ 5 FF al la
franca poŝtĉekkonto n-ro 2157-
283 Paris de la sama persono.

EKOLOGIA SUPLEMENTO DE HEROLDO

La ĵus aperinta scienca suple-
mento de "Heroldo", kiun ĉiuj
abonantoj senpage ricevis, es-
tas dediĉita al la ekonomia
kaj biologia aspektoj de la e-
kologio, la scienco kiu studas
la rilatojn inter la homo kaj
la natura medio.

Kvar fakuloj publikigis en la
numero siajn eseojn, nome :

- Bert de Wit (Nederlando) :
"Minacata naturo - minacata
homo"
- Hukunaga (Japanujo) : "Mino-
mata"
- Wilfried de Vlieghere (Belg-
io) : "La estonteco de nia
industria socio"
- Marinko Givoje (Jugoslavio) :
"Protekto de la homa medio -
la plej grava nuna homara
tasko".

La scienca suplemento estas re-
daktita de s-ro A. Fernandez,
la aŭtoro de la popularscienca
libro "Senĝenaj dialogoj".

BIBLIOGRAFIO



Simone Glodeau: "Une humanité, une langue"; 48 p.; eldonis SAT-Amikaro, Parizo; prezo 3 FF.

Jen bona informa broŝuro en franca lingvo. Krom la informaj artikoloj enestas ankaŭ iom da biografio pri D-ro Zamenhof, iom pri la strukturo de nia lingvo kaj iom da historio pri mondlingvaj projektoj. Parolante pri la forteco de la angla lingvo, la aŭtorino mencias ankaŭ la kontraŭstaron kontraŭ la angla. Tamen tiu problemo ne estas sufiĉe profunde pritraktita. Ĝi ja estas nunmomente LA problemo por la prosperigo de Esperanto.

F.R.

Albert Lienhardt: "Modela prononco de la interlingvo Esperanto"; 20 p.; represaĵo el "Scienca Revuo"; prezo 16 fr.

Ĉar ni ofte konstatas, ke eĉ altranguloj el la Esperantomovado ne sukcesas korekte prononci la Internacian Lingvon, broŝureto pri tiu temo certe estas bonvena. S-ro Lienhardt donas klarigojn pri la prononco kaj pri la akcento en simplaj kaj kunmetitaj vortoj. Precipe tamen la ĉapitro pri la prononco estas iom malfacile komprenebla kaj eble eĉ senvalora sen la akompana sonbendo. Malgraŭ tio la verketo estas interesa posedaĵo por la lingvistoj kaj Esperanto-instruistoj.

P.P.

Jean Habert kaj Marcel Boubou: "Nouveau Cours Rationnel et Complet d'Espéranto". 180 p.

Prezo: 16 FF. Eldonis: SAT-Amikaro, Parizo.

Iom mirige ke ni recenzas libron de du samideanoj jam de longe mortintaj! Ĝi estas jam la oka eldono de lernolibro kiu unuafoje aperis en 1921. Kun emfazo ni devas laŭdi tiun libron pro ĝia klareco (ekz. pri la akuzativo), pro la ekzercoj kaj ankaŭ grandparte pro la desegnaĵoj kiuj instruas multajn vortojn. Kelkaj rimarkoj: la prizorgintoj devintus menciigi, ke la litero "ŭ" estas konsonanto. Alie oni ne komprenas la akcenton en vortoj kiel neŭtra(la) k.a. La klarigoj pri la uzo de "sia" estas ne kompletaj. Malgraŭ tio, sininstruantoj disponas tie ĉi pri plej bona libro. Aliflanke preskaŭ ĉiuj profesoroj havos bonegan helpilon per tiu ĉi kurso.

F.R.

Jean Thierry: "L'espéranto sans peine". 420 p. Eldonis Assimil, Parizo/Bruselo

Jen denove eminenta verko eldonita de konata franca firmo. La serion "Le ... sans peine" (La ...-a lingvo sen peno), ni verŝajne ne plu devas prezenti al vi. La fakto, ke jam centmiloj da kurslibroj estas venditaj valoras pli ol recenzo.

Pri la esperanta versio oni, krom iom multe da francismoj, verŝajne nenion au preskaŭ nenion povas riproĉi. La lingvaĵo estas perfekta; eĉ altnivela. Mi eĉ dirus, ke la meza esperantisto povos el ĝi ankoraŭ lerni multegon. Preserojn mi ne sukcesis trovi, kio

estas laŭ mi menciinda por libro de 420 paĝoj.

Mi diris ke preskaŭ nenion oni povas riproĉi. Efektive, du demandojn mi ŝatus starigi. La sufiĉe malfacila paragrafo el nia gramatiko pri transitivaj kaj netransitivaj verboj (-ig/-iĝ) estas klarigata tre bone, sed komplete en Esperanto. Ĉu la lernanto en tiu momento jam estos sufiĉe lerta por "asimili" tiun tiklan punkton? Due, ĉu vere estas necesa instrui neologismojn kiel "ekskuzi" kaj "devanci" kiam ekzistas aliaj multe pli oftaj vortoj? Haveblas kun la libro diskoj aŭ kasetoj. Ilin mi ĝis nun ne povis juĝi, sed se ili estas samnivela kiel la teksto mem, ni vere povas paroli pri tre valora verko por niaj francparolantaj geamikoj. Ni nur esperu ke baldaŭ sekvos ankaŭ nederlanda versio. Ho jes, ankoraŭ unu rimarko, la plasta kovrilo de mia libro difektiĝis jam post unuhora uzado, sed pri tio ĉi verŝajne Jean Thierry ne kulpas!

P.P.

P. Korte: "Savo el la Neĝo", 77 paĝoj. Eldonis: Dansk Esperanto-Forlag, Aabehøj, Danujo. Prezo: 9 danaj kronoj.

La verkinto de sukcesa lernolibro nun verkis romaneton, facile legeblan, por komencantaj geknaboj. Mi kredas, ke ankaŭ en tio li sukcesis. Ĝi estas

sufiĉe atentokapta. Nekutime estas, ke ĉiu folio estas je unu paĝo presita kaj je la alia nepresita, tial ke la leganto povas fari skribajn notojn. Tial mi opinias, ke povis esti iom pli da vortoj en la teksto (kiujn la leganto devus serĉi en vortaro kaj noti).

F.R.

KORESPONDI DEZIRAS ...

Volonte interŝanĝos leterojn pri efektiva kaj vera amo de la sincera verda koro s-ro F. Straňanek, Misteckà ul. ĉ. 499, CS-73921 Paskov, Ĉeĥoslovakio. Li ankaŭ deziras interŝanĝi bildkartojn kaj memoraĵojn.

DISE EN LA MONDO

Ĉu vi volas ĝui fruktajn feriojn, kunigante la utilon al la plezuro? Jam mi spertis tion dum Kristnasko-ferioj en Adalboden, Svislando. En tre komforta kaj varma ĉaledo, oni povas ĉeesti dum du semajnoj, kun 20 - 25 geesperantistoj el diversaj landoj. Oni tre bone manĝas kaj dormas! Prezo tre malalta! Ski-kursoj kaj tri ekskursoj senpagaĵ! Vesperoj kun prelegoj, diskutoj, festoj, ludoj... Krokodilado ne estas tolerata!

La ĉaledo ne estas elasta, do, jam nun aliĝu se vi deziras esti inter la 25 partoprenantoj! Petu informojn de s-ino Vertongen, 4700 Eupen.

MEET WELGERENDE
FRANCAZEN VOOR HEDERNE HERENKLEEDING



int duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEEDING

ROUWEN - IPOORTJAREN - BOELEN
WITBOVEN - CARABATJEN - LODJEN
ETJELVON HAA TWEE

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN



RABATO POR ESPERANTISTOJ

Por ĉiuj viaj asakuroj kaj reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co P.V.B.A.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Agentejo en Nederlando:

ROTTERDAM, Korte Hoogstraat 9

Telefono 1142 19 - Telekso 23243 - Telegr. "Pernwem"

Reprezentita en Londono kaj ĉe "Lloyd's of London".

Korespondantoj en la tuta mondo

Unuaklasa servo

Kompetentaj fakuloj

KORESPONDO EN ESPERANTO

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631

Hoboken

Vitraloj - Speguloj -

„securit“ vitro

kolorigitaj vitroj

aluminiaj senmastikaj

stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por

tutvitra-konstruaĵoj

mastiko

Telefono 272875